REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 6 (43) decembro 2007*




en la numero

la 2-a Lingva Festivalo en Moskvo
Malferma Tago en Centra Oficejo
mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko pri la Jaro de Lingvoj
E-kursoj tra la lando
E-eldonaĵoj en Rusio en 2007
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2007

enhavo:

01 La 2-a Moskva LF
03 Versaĵo de Klara Ilutoviĉ pri la 2-a MLF
04 12-a LF en Ĉeboksari
04 Nova ruslingva lernolibro
05 Velura Sezono – 13
07 Rememoroj pasintaj... (la uljanovskanoj pri RET-07)
09 Kanto de J.Karcev "Vi ne solas!"
11 Ĝenerala Direktoro de Unesko pri la Jaro de Lingvoj
12 18 landoj vizitis la Malferman Tagon
13 Malferma Tago – kaj UK en Moskvo
16 E-kursoj tra la lando
17 REU-Jarlibro por 2007
17 Rimarkoj pri la Jarlibro
18 Elektado de Komisionoj komencita
18 Funkciuloj de UEA vizitis Bjalistokon
19 UEA kaj ILEI ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko
20 Sukcesa konkurso en Svislando
20 Unu el kvar membroj uzas la retan Jarlibron
21 Kotizoj de REU/REJM por 2008
22 "Flugiloj de malfacila vento ĉe Azova maro"
22 Universitata lekcio
22 Internacia mara Esperanta renkontiĝo
23 UEA invitas prelegi en la Roterdama IKU-sesio
23 Forpasis Volodja Denisov
25 E-eldonaĵoj en Rusio en 2007
27 Belartaj Konkursoj de UEA en 2008
28 Ĉiamverda lernolibro
30 "Blanko sur nigro"
31 Thorsen-apogo al kvin bibliotekoj
32 En fino ĉiamas komenc'
32 TILE-3 en Soĉi
10, 19, 27 Anekdotoj
k3 Kalendaretoj por 2008
k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
k4 FELIĈAN NOVJARON AL ĈIUJ!



aperis en tri volumoj 2-a eldono de la fama romano de J.R.R.Tolkien "La Mastro de l' Ringoj" en E-traduko de W.Auld

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (43) decembro 2007

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2008:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 250 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

KALENDARETOJ POR 2008

Uljanovska E-klubo kaj Rusia Esperantista Unio denove proponas al vi poŝkalendaretojn. Ĉi-jare estas eldonitaj tri specoj de kalendaretoj.

La prezo por la kluboj estas 3 rubloj plus sendokostoj. Minimuma mendo – 20 samspecaj ekzempleroj. Se en via urbo mankas klubo, ni pretas sendi malpli da ekzempleroj po 5 rubloj plus sendokostoj.

Atentu: ni daŭre opinias, ke la kalendaretoj estas bona reklama rimedo. Lige al tio, se via klubo deziras daŭrigi pasintjaran reklamkampanjon pri disdonado de kalendaretoj, ni pretas parte subvencii tiun agadon. Skribu pri via deziro aliĝi al la kampanjo al la adreso <yuka@yandex.ru>, indiku deziratan kvanton kaj la sumon, kiun via klubo pretas investi al la afero, kaj ni decidos pri la kvantoj kaj kondiĉoj. La kalendaretoj povas esti disdonataj en bibliotekoj (precipe fremdlingvaj fakoj), universitatoj kaj aliaj taŭgaj lokoj.

Jurij Karcev (Uljanovsk)

☺ AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ ☺

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

amleksigita (anst. ampleksigita)

dradukita (anst. tradukita)

Penato Corsetti (anst. Renato)

Rodo Familia (anst. Rondo)

Rusia Esperantista Unuo (anst. Unio)

sesono (anst. sezono)



FELIĈAN NOVJARON AL ĈIUJ!

LA KRESKO



Dimanĉe, la 28-an de oktobro, sukcese pasis la 2-a Moskva Lingva Festivalo. Senĝene eblas trakti ĝin kiel novan, pli altan ŝtupon de la MLF-evoluo. Mi komencu de la sekaj formalaĵoj.

La programo estis sufiĉe tradicia: la Solena Malfermo, lingvoprezentado en sep 12-lecionaj paraleloj (blokoj), 2-hora koncerto kun la Solena Fermo kaj regalo por la lingvoprezentintoj kaj la Organiza teamo. Paralele kun la lingvaj prezentoj okazis kelkaj specialaĵoj: poduhoraj Lingvaj Teritorioj (la germana, la iberorumana, la slava kaj Esperanta), renkontoj kun interesaj homoj (la rabeno Aleksandr Fejgin kaj la poligloto Villi Melnikov) kaj 1 majstro-klaso: "La profesio – gvidisto-interpretisto".

Estis prezentitaj 40 lingvoj, preskaŭ ĉiuj – po 2-foje, 2-3 – 1- aŭ 3-foje, Esperanto estis prezentita 4-foje. En la postfesta demandaro multaj entuziasme menciis la E-prezentojn, kaj el 80 plenigitaj demandaroj en 10 estis menciita deziro lerni Esperanton post la vizito al la prezentado.

Nun ni revenu al la evoluo.

Ĉi-foje kiel festivalejo estis elektita granda universitato – MGIU, antaŭa MASI, enkadre de kiu en 1995 naskiĝis la organizanto de MLF-oj – Moskva junulara Esperanta klubo "EK MASI".

La fakto mem de transiro el lernejo al universitato formale jam atestas pri la kresko. La ŝanĝo de la ejo al pli granda ebligis celi pli da publiko (kaj la Festivalo





ensorbis ĝuste tiom, je kiom ni esperis – entute ĉirkaŭ 500 homojn) kaj pli imponan koncerton kun pli profesiaj kaj amasaj kolektivoj, dancaj kaj muzikaj. Ni kreis la emblemon de MLF, "firmaajn" diplomojn kaj formularon, sur kiu estis skribitaj ĉirkaŭ 50 invitleteroj al moskvaj gravuloj. Tute ne havante monon, ni riskis mendi bonkvalitajn stratreklamojn, per propraj fortoj bele ornami la scenejon, organizi konstante funkciantan senpagan bufedon por la instruantoj, organizantoj kaj artistoj, ankaŭ riĉegan regalon por ili ĉe la fino. Sen rajto eĉ vendi biletojn, ni sukcesis akiri tiom da mono, ke la Festivalo iĝis signife profita por la kluba kaso.

Sed ĉion ĉi mi apartenigus al la organizaj atingoj kaj formalaĵoj. Multe pli gravas, laŭ mi, ekesto de la energetika fono, firmiĝo de la etoso de samideaneca krea kunagado, kiu regis en la Festivalo kaj kies fonto estis ne tiom la organizantoj, kiom la lingvaj instruantoj kaj la gastoj. Tiu fono nun bone respeguliĝas el la reeĥoj pri la Festivalo.

La Festivalo sukcesis altiri mirindajn personojn, kiujn mi nomus per la vorto "niaj". Ili venis pro la motivoj, bazaj por tiu ĉi aranĝo: la amo al la propra aŭ fremda lingvo, intereso kaj estimo al aliaj popoloj kaj kulturoj, deziro disdividi siajn sciojn kaj sentojn kun la aliaj. Ili venis, ĉar sentis la ideon de la Festivalo grava, interesa kaj entuziasmiga. Ili venis – kaj trafis la grandan kompanion de nekonataj samideanoj. Mi kuraĝas diri, ke la festivala etoso kompareblas kun tiu de Esperantaj kongresoj, kie multaj gravaj por ni aferoj ne bezonas vortumadon, ĉar "inter la siaj" klaras senvorte. Jes, ni sukcesis krei la etoson de Esperanta kongreso – kaj la novuloj estis ŝokitaj pro ĝi. La nova sento. Vidu la impresojn ĉe la ttt-ejo de LF < http://moskvo.ru/lf/>.

La lingvoprezentantojn ni serĉadis per Interreto, ekzemple, en prilingvaj paĝaroj. Tre sukcese. Preskaŭ ĉiuj tuj diris "jes". Sed multaj homoj, precipe dum la lasta antaŭfestivala semajno (kiam ni organizis la duan ondon de la Interreta reklamo), trovadis nin mem. "Ĉu vi bezonas la (nomo de la lingvo)? Mi volas ĝin prezenti." Kial la homoj serĉas por si kroman ŝarĝon?! Ĉar ili estas "la niaj"! Konatiĝoj kun novaj kaj novaj lingvoprezentontoj, en la lernejo dum la specialaj kun-



venoj aŭ en moskvaj kafejoj, estis tre emocia, pasiiga kaj entuziasmiga momento de la Festival-preparado – la senĉesa fonto de mia propra energio kaj forto. Kaj mi rifuzis al neniu. Se mi jam havas la stelon por la hispana – karisman kaj brilan instruiston el MGU, mi ne rifuzas al la studento de la 3-a lernojaro, kiu amas la lingvon kaj deziras ĝin prezenti. Mi nur serĉas variantojn, kiel plej bone, plej harmonie kombini la du tiom malegalajn instruantojn – por ke ili ne konkurencu. Mi diras "jes, certe!" al ĉiu adekvata homo, kiu volas esti prezentanto. Tamen se antaŭ ni estas malspertulo, necesas pli zorge kaj multe kun li/ŝi labori dum la konsultado. Per tio ni atingas tuj multajn celojn, unu el kiuj, cetere, estas la publiko. Ja kun ĉiu prezentanto, precipe juna, kutime venas zelotoj. Kaj poste ili iĝas amikoj de la Festivalo.



Do, kiel ĉiam, la homoj estas nia plej valora akiro. Kaj ni revas pri plifortigo de la organiza teamo el la vico de la novvenintoj. Kaj ni generas novajn planojn. Kaj ni sentas nin survoje al pli altaj pintoj.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

La 2-a Lingva Festivalo en Moskvo



Sin prezentas je l' vivkoloroj
En vastege amika rond'
Kvardek lingvoj kun siaj moroj
Kaj kapturne bizara mond'.

Festivalo de lingvoj bolas –
Kien iri, al kiu blok'?
Tie turke la ej' parolas,
Por la sveda – alia lok'.

Esperanto kaj la helena
Je la internajbara pac'
Sin aŭdigas per voĉo plena
Sendepende de l' tempa spac'.

Kaj la ĉina timigas vane –
Ajna lingvo lernatu nur,
Ke akceptu samideane
Ĝiaj anoj, teren', kultur'.

Subtilaĵoj de tradukado,
Elokventa parol' de l' gest' –
Admiriga impresinvado,
Lingva ĉarmo, jubil' kaj fest'.

Konsonantoj de l' abazina –
Kio pli malfacilas nun?!!
Kvardek lingvoj dum voj' senfina –
Grandaj disoj en granda kun'.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

12-A LF EN ĈEBOKSARI

La vica Lingva Festivalo okazis en Ĉeboksari la 20-21-an de oktobro. Ĝi enhavis prezentojn de pli ol 40 lingvoj, kiuj okazis paralele dum du tagoj. La honora gasto ĉi-jare estis moskva poligloto Villi Melnikov, kiu posedas 103 lingvojn. La festivalon vizitis ĉirkaŭ 1000 interesiĝantoj pri lingvoj.



Venis pluraj esperantistoj – el Tjumenj, Moskvo, Sankt-Peterburg, Volgograd, Kazanj, alilandanoj Carlos el Hispanio kaj Andreo Teravainen el Latvio. Denove venis amasa studenta grupo el Uljanovsk, gvidita de Margarita Karceva kaj Jurij Karcev.

Esperanto estis plurfoje prezentita (fare de Garik Kokolija, Andrej Grigorjevskij, Aleksandr Blinov kaj Konstantin Viĥrov), kelkdek personoj enskribiĝis al la estontaj E-kursoj.

Garik Kokolija (Moskvo)

NOVA RUSLINGVA E-LERNOLIBRO

Ĉe la eldonejo "Vostok-Zapad" aperis lernolibro de Claude Piron kaj Irina Gonĉarova "Uĉebnik jazika esperanto. Naĉaljnij kurs". La lernolibro estas bazita sur la fama "instrua romaneto" de Claude Piron "Gerda malaperis!" Al ties teksto Irina Gonĉarova aldonis gramatikajn komentojn kaj ekzercojn. Kredeble, la libro aperis en la sama kvanto kiel la antaŭaj E-eldonoj de "Vostok-Zapad" – 2 mil ekz. – kaj same vaste vendiĝos tra la tuta lando. Necesas noti, ke tiu ĉi jaro estis vere sukcesa vidpunkte de novaj ruslingvaj E-lernolibroj! *(Vidu pri tio la ĉi-numeran artikolon "E-eldonaĵoj en Rusio en 2007". – G.K.)*

(esperanto-rus-informoj)

VELURA SEZONO-13

La 6-an de oktobro finiĝis la festivalo, kaj post kelkaj tagoj ĉiuj partoprenintoj disveturis. La festivalon alveturis 33 esperantistoj el Ukrainio, Rusio, Belorusio, Pollando, Belgio, Germanio, Usono, Svedio, Nederlando. Krome ĝin vizitis gaste 6 famaj bardoj kaj 20 jaltanoj. Do entute ĉ. 60 personoj – malpli ol pasintjare.

Ĉi-jare la festivalo ne similis la antaŭajn. Ĝia celo propagandi Esperanton por la ekstera publiko ne plu estis ĉefa – ĉiuvespere ĉe lignofajro ĝisnokte okazis koncertoj en Esperanto de la festivalanoj Georgo Handzlik, Aleksandr Ĥrustaljov, Pavel Moĵajev, Marija Koĉetkova, Maksim Ŝabala, Igorj Glagolevskij. Apartajn koncertojn en la rusa donacis la plej famaj krimeaj bardoj Konstantin Frolov kaj Vladimir Ŝiskin kun Pavel Grebenjuk.

Krome la festivalo ne plu estis kanta. La unuan fojon en la programo aperis spektaklo de profesia teatro. Por la urbo okazis du koncertoj: la unua en granda halo de la urba kultura centro, la dua en la klubo de Kirov-ripozejo, kie funkcias la jalta E-studio. La dua komenciĝis en fama salono "Nigra maro" ĉe la klubo. Estis prezentita muzik-drama spektaklo "Oksigeno" de Ĥarkova aŭtora teatro "Kotelok", t.n. "manifesto de junularo de 21-a jarcento". Tuj post la 1.5-hora spektaklo la publiko transiris al la halo por la koncerto.



En la urbo, kiel kutime, pendis afiŝoj de la festivalo, sed la balotoj malhelpis. Ja pendigi ilin eblis nur ekde la 1-a de oktobro, sed la koncerto okazis jam la 5-an. Antaŭ la koncerto la festivalanoj disdonadis flugfoliojn. Ili ricevis mil tiujn, sed kontroli, kiom ili disdonis, ne eblis, verŝajne nur parton. Rezulte en la haloj estis malmulte da neesperantistoj.

Dum la festivalo okazis turistado al montaro Uĉ-Koŝ kaj Botkin-pado, ekskursoj al Massandra palaco, Voroncov-palaco en Alupka kaj Livadia palaco – Suna pado – kastelo "Hirunda nesto". La plej interesa estis tre malmultekosta 11-hora busa vojaĝo tra Krimeo (Foros, Balaklava, Sebastopolo, Upenskij monaĥejo, Baĥĉisaraj, kaverna urbo Ĉufut-Kale).

La unuan fojon oni permesis sur kampeto de la bazejo starigi tendojn kaj aranĝi lignofajron. Kaj tio ŝanĝis spiriton de la aranĝo. Aperis eblo ĉiuvespere organizi individuajn koncertojn en Esperanto, ĉar antaŭe eĉ niaj steluloj povis kanti nur po kelkaj kantoj dum la koncertoj por ekstera publiko.

La organizantoj multe laboris por prepari la festivalon: kompilis E-kantarojn, liveris multe da lignaĵo por lignofajro, kontraŭ eventuala pluvo konstruis tegmen-

ton super parto de la kampeto, kie konstante staris tablo por senpaga teumado. Ĉi loko estis lumigita eĉ nokte. Kvankam en la bazejo forestas manĝejo, la manĝado estis bone organizita. Matene oni transportis bongustajn diversspecajn laktaĵojn, kiujn la festivalanoj povis aĉeti tuttage. Poste oni alveturigis nemultekostan varman vespermanĝon, ankaŭ tagmanĝon, kiam la festivalanoj ne ekskursis.



Grandan laboron antaŭ kaj dum la festivalo faris Anĵela Belenko, Irina Gerasimova kaj Aleksandr Gerasimov, Vjaĉeslav Katin.

Ĉio ĉi kaj la bonega vetero faris bonan etoson. Aliflanke la partoprenantoj tuttage okupiĝis pri ripozo, ekskursoj, naĝado, kaj por aliaj komunaj aranĝoj restis tempo nur malfruvespere post la vespermanĝo, kiam mallumiĝis kaj eblis kolektiĝi nur ĉe lignofajro. Sed tie ne eblis kanti komune, uzante la preparitajn kantarojn.

Inter la partoprenantoj estis ankaŭ familioj kun infanetoj. Maŝa Koĉetkova, kiu loĝis kun du infanoj en tendo, eĉ turistis tutfamilie al Demerĝi kaj ofte koncertis, kiam la suĉinfano dormis.

La organizantoj decidis sekvajare organizi la koncertojn por ekstera publiko nur en la kajo, kie ĉiam estas spektantoj. Kaj anstataŭ kelkaj kutimaj ekskursoj fari du 10-horajn tra Krimeo.

Dum la festivalo krimea televido intervjuis Jim Rayan (Usono), Gunnar Olsson (Svedio) kaj la kantantan Maŝa Koĉetkova, ĉirkaŭitan de gejunuloj. Intervjuis ĵurnalistino Kristina Ŝapran, nia klubanino.

Sincere parolante, komence de la aranĝo pro malmultaj venintoj mi volis ne organizi la festivalon sekvajare, ĉar somere verŝajne okazos la "Internaciaj ĉemaraj E-tagoj" en Krimeo. Sed la loko de la festivalo tiom plaĉis kaj impresoj de la partoprenantoj tiom bonis, ke mi tamen decidis organizi VS-14 sekvajare. Eĉ se estos la sama kvanto de la partoprenantoj, ili denove ĝuos.



Kurta statistiko: Ukrainio – 15 partoprenintoj, Rusio – 6, Belorusio – 5, Pollando – 2 kaj po unu el Usono, Svedio, Belgio, Germanio, Nederlando.

Jefim Zajdman (Ukrainio)



REMEMORAJ PASINTAJ…

kvar uljanovskanoj pri RET-07

Kiaj estas viaj plej grandaj impresoj de RET-07?

Sergej: Loĝado sur bordo de maro. Vidiĝi, renkontiĝi kaj interparoli kun tiaj diversaj, sed entuziasmaj, famaj, estimataj personoj el multaj urboj.

Jurij: Novaj renkontiĝoj kun malnovaj konatoj.

Olga: Mi volas mencii grandan nombron da interesaj, gajaj kaj amikemaj homoj. Komunikiĝi kun ili estis granda plezuro por mi. Krom tio mi ne povas forgesi la koncerton de JoMo, kiu tre plaĉis al mi.

Rita: La koncerto de JoMo kaj kantoj de Nina Djomuŝkina kaj Nikolaj Terentjev nokte en la malgranda amika rondo ("Gufujeto" laŭ Raja Kudrjavceva).

Kion vi partoprenis persone? Kion vi faris dum la festivalo?

Rita: Mi laboris en la manĝejo kiel "kontrolistino". Al mi plaĉis saluti la homojn trifoje ĉiutage. Tiamaniere mi ekkonis multajn homojn.

Mi vizitis E-kurson de Aleksandr Osincev, kanto-instruadon de Mikaelo Povorin, danco-kurson de Irina Romanova. Tion mi bezonas por laboro en nia E-klubo.

Ne forgesos mi fotokuradon, kie nia teamo "Valerita" (Valeria + Lena + Irina +Rita +Tatjana) venkis. Estis tre agrable!

Mi partoprenis ekskurson al la lotusoj. Neforgeseble!

Jurij: Laboro en la libroservo, lingvaj kursoj, tabloteniso.

Sergej: Mi okupiĝis en kursoj por progresantoj, kanto-instruadoj, vizitis kaj aŭskultis interesajn koncertojn de bardoj, kantojn apud lignofajro, ludis en tenisa turniro.

Olga: Kio koncernas min, mi strebis partopreni en diversaj aranĝoj. Kaj kvankam kelkaj partoprenantoj forlogadis min, tamen mi sukcesis kanti, ludi tenison kaj bilardon, kanti ĉe la lignofajro. Ĉio estis tre interesa kaj gaja.



Kio estis la plej granda surprizo dum la renkontiĝo ĉe la Azova maro?

Olga: Por mi preskaŭ ĉio estis surprizo. Ĉio estis nova kaj malordinara: homoj, aranĝoj, naturo, maro, vivo en tiu loko.

Jurij: La vetero.

Sergej: Profundeco de la Azova maro! Naĝante, mi



tuŝis per la ventro fundon de la maro (ŝerco). Mirigis min vasta geografio de la partoprenantaj de la festivalo, precipe el malproksimaj urboj, landoj.

Rita: La dueto de JoMo kaj Juĉjo.

Kion vi ricevis lingve?

Sergej: Grandegan inspiron por poste studi tiun mirindan kaj riĉan lingvon, kiu ne scias limojn kaj aĝon.

Jurij: Praktikajn sciojn pri tradukado dum la metiejo de Mikaelo Bronŝtejn.

Olga: En lingva aspekto mi havis bonan eblon por praktiki Esperanton. Krom tio la lingvaj kursoj helpis min memori gramatikon kaj leksikon kaj ekscii multajn novajn vortojn. Mi havis interesajn kaj gajajn taskojn kaj tre bonan grupon.

Rita (ridante): Mia ŝatata vorto estas nun "ĉar". Okazas, ke tiu vorto helpas respondi preskaŭ ĉiun "kial"-demandon. Mi uzas nun korekte la verbojn "aŭdi" kaj "aŭskulti", ekzemple: "Mi aŭdas vin" kaj "Ni aŭskultis kantojn de Vizbor". Dank' al Lera Cvetkova mi povas rapide diri, kioma horo estas nun. Ni lernis tion en la maro. Mi neniam forgesos akuzativon. Tiun frazon lernis ni kun Saŝa Osincev, nia instruisto. De li mi eksciis dum E-kurso novajn metodojn por laboro en E-klubo. Vladimir Bespalov parolis kun mi nur Esperante kaj helpis, se mi forgesis iun vorton. Ne timu! Tiel li diris, se mi havis vort-problemojn. Dum nia promenado al la urbo mi parolis kun Lena Artimuk nur Esperante. Ankaŭ Raja Kudrjavceva estis tre pacienca kaj helpis al mi. Mi pensas, ke nun mi ne tre timas paroli Esperante.

La programo estis enhavriĉa. Ĉu vi sukcesis naĝi?

Rita: Ho, certe! Dufoje aŭ trifoje ĉiutage. Unufoje mi naĝis nokte sub stelplena ĉielo. Kia beleco!

Jurij: Jes, preskaŭ ĉiutage.

Sergej: La programo estis superplenigita per diversaj eroj, tial mi sukcesis naĝi nur frumatene.

Olga: Naĝi?! Por naĝi tempo sufiĉis. Des pli ke nia tuta nokto estis libera.



RET kaj OkSEJT kune por ĉiam?

Rita: Jes, nature! Gravas, ke oni povas konsulti. Pli multaj spertuloj ĉiam helpas.

Jurij: Tion necesas demandi al junularo.

Sergej: Kunfandaĵo de juneco kaj matureco estas ideala formo por efektivigi similajn Esperanto-kunvenojn. Junaj homoj tiras sin al la spertaj, studas ĉe ili. Aĝaj

homoj ŝarĝiĝas per energio de la junaj.

Olga: Mi pensas, ke tio estas bona ideo: kunigi pli aĝan kaj junan generaciojn de esperantistoj. Junularo povis lerni de pliaĝuloj pri sperto kaj saĝeco. Sed komunikiĝi kun junularo estis interese por pli aĝa generacio. En aranĝoj partoprenis homoj sendepende de aĝo, ĉiuj kune.

Ĉiuj kune: Grandan dankon al la organiza komitato por ebleco lerni kaj ripozi ĉe Azova maro.

<u>Kion vi deziris, kiam via aerbalono forflugis?</u>

Jurij: Prosperon al Esperanto.

Sergej: Estas malĝoje disiĝi, sed baldaŭ okazos novaj renkontiĝoj. Mi devas multe lerni, por libere komunikiĝi kun grandaj homoj de la tuta mondo.

Olga: Mi deziris, ke tiaj renkontiĝoj denove ripetiĝu. Mi esperas, ke tio ne estis mia lasta Esperanta aranĝo. Mi tre ĝojas, ke mi trovis multajn tre bonajn geamikojn kaj mi deziras en estonto ekhavi novajn geamikojn. Ni ne solas!

Rita: Tio estas granda sekreto. Sed mi pensas, ke multaj homoj deziris renkontiĝi kun siaj novaj kaj malnovaj geamikoj. "Kie ree nin viv' kunigos", tio estas malfacila demando. Sed ni renkontiĝos! Ĝis la revido!

Margarita Karceva (Uljanovsk)

Vi ne solas!

Jurij Karcev

Dm G_7
1. Se vi hejme sentas vin sola,
C A_7
Ege tedis viv' metropola,
Dm G_7
Svarmo de tumulto popola,
C A_7
Fluo de la rutin', –
Dm G_7
Vi rigardu al kalendaro,
C A_7
Venu al la verda tendaro,
Dm G_7
Kiu jam ĉe varma maro
C
Atendas vin.
F
Pina arbar',
Nokta gitar',
C
Alta ĉiel', mevo kaj lar',
G_7
Kaj se vi ŝanĝi vian vivon volas –



Tiu ĉi kanto estas verkita de Jurij Karcev speciale por RET-07, kiu havis la ĉeftemon "Vi ne solas!". Sur la foto estas Jurij Karcev kaj JoMo.

C
Vi ne solas!

2. Kiam en meznokta silento
Venas endormiga momento,
Helpos vin en tiu turmento
De geamikoj vek'.
Se vi kantos eĉ en dezerto,
Tuj en ĝi okazos koncerto,
Kaj alvenos ĉiu lacerto
Al diskotek'.
Laŭta muzik',
Nova amik',
Gaja frenez' pro amplifik',
Kaj se vi tutan nokton rokenrolas –
Vi ne solas!

3. Se vojaĝas vi tra la mondo
Kiel gaja turist' – vagabondo,
Pri la vojo mankas respondo,
Ne helpas la publik', –
Vi en fremda urbo ne ploru,
Esperanton tuj rememoru,
Ne silentu kaj bonhumoru,
Kaj venos amik'.
Urba promen',
Kluba festen',
Kaj babilad' ĝis la maten',
Kaj se kun geamikoj vi parolas –
Vi ne solas!

Larmanta edzino ripoĉas la edzon:
– Vi eĉ ne interesiĝas, pro kio mi ploras! Ĉu mi diru?
– Ne indas, mi tutegale ne havas tiom da mono!
(per-esperanto-humuro)

4. Se vi trafis al kosma spaco,
Malproksimas tera surfaco,
Kaj vi kun malĝoja grimaco
Pensas pri la destin', –
Flugu al alia planedo,
Vin renkontos en kabaredo
Simpatia, kun rozbukedo
Aliplanedanin'...
Verda vizaĝ',
Centjara aĝ', –
Jen la rezult' de la vojaĝ'!
Sed… se via ampasio bolas –
Vi ne solas!

ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO PRI LA JARO DE LINGVOJ

S-ro Koichiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, publikigis mesaĝon pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. En ĝi li skizas ĉefajn idealojn kaj celojn de tiu speciala jaro, al kiu estos dediĉita ankaŭ la temo de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo en 2008. UEA aperigas la mesaĝon en Esperanta traduko kun la celo, ke ĝi estu vaste diskonigata inter esperantistoj.

Mesaĝo de S-ro Koichiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko,

pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj.

La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktoro por antaŭeniri al daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de Edukado por Ĉiuj (EPĈ) kaj la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC) aprobitajn de Unuiĝintaj Nacioj en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato (JEC 1), dum kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo ili estas ankaŭ nepraj por atingi universalan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al naturmedia pluteneblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikite en la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco de Unesko kaj ĝia Agoplano (2001), la Konvencio por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo kaj la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimoj (2005).

Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj – malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon – forestas en la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale en la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj.

Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la ciberspaco aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la ekonomio, inter la lingvoj kaj scioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo "lingvoj gravas!" estu diskonigata ĉie.

Tiukuntekste, la 21-a de februaro kiel dato de la naŭa Internacia Tago de la Gepatra Lingvo havos elstaran signifon kaj estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon, sur la nacia, regiona kaj internacia niveloj, pri la graveco de la lingva diverseco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la ciberspaco kaj komerco.

La Internacia Jaro de Lingvoj 2008 alportos unikan ŝancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj celoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

18 LANDOJ VIZITIS LA MALFERMAN TAGON

La 27-a Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 24-an de novembro, allogis 110 vizitantojn el 18 landoj. Por la dua fojo la prelegoj de la Malferma Tago okazis en la nova konferencejo de la UEA-domo, sed en la antaŭa fojo tie ankoraŭ mankis ŝovebla son-izola muro inter la ĉambroj Kanado kaj Aŭstralio, kiuj pli frue servis kiel ejo de Biblioteko Hector Hodler. Ĉi-foje ambaŭ ĉambroj estis kunigitaj en unu grandan salonon po du horojn komence kaj fine de la tago, sed dum tri horoj okazis en ili samtempe du paralelaj programoj.

Komence la libroservisto Ionel Onet konatigis al la publiko la plej lastajn novaĵojn de la Esperanta merkato. La ĉefa gasto de la Tago estis la konata historiisto d-ro Ulrich Lins, kiu faris du prelegojn, "Esperanto kiel lingvo kaj ideo en orienta Azio" kaj "Mia alproksimiĝo al Zamenhof". La dua prelego ligiĝis al lia redakta laboro super la sesa eldono de la klasika verko "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat, kiun UEA lanĉis en la UK en Jokohamo. Alia historiisto, d-ro Ziko van Dijk, elpaŝis en sia ne malpli konata rolo de fakulo pri Esperanto-informado, prezentante sian plej freŝan libron,



Osmo Buller

“Informado praktike”. Unu el la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-verkistoj, Jorge Camacho, prezentis ne nur sian propran novan verkon, la poemaron “Eklipsas”, sed ankaŭ la volumon “La lingvo serena” kun kolektitaj poemoj kaj eseoj de la Nobel-kandidato Baldur Ragnarsson, kaj la novan periodaĵon “Beletra Almanako”, kies unua volumo ĵus aperis. Alispecan verkon, sian lernolibron “Esperanto per rekta metodo”, prezentis Stano Marĉek, kiu lanĉis ĝian nederlandan eldonon en la Malferma Tago. Kvankam origine lanĉita antaŭ kelkaj jaroj, al multaj vizitantoj ankoraŭ nova estis ankaŭ la DVD-kurso “Esperanto – pasporto al la tuta mondo”, kiun prezentis Lusi Harmon kaj Diana Babeck-Weichert.

La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun ĝisnunaj kaj estontaj projektoj de E@I (Esperanto ĉe Interreto), i.a. la planata reta informportalo pri Esperanto, kaj kun la agado kaj celoj de la eŭropa Esperanto-partio “Eŭropo-Demokratio-Esperanto”. La programon finis unuhora renkontiĝo kun estraranoj de UEA, dum kiu Ranieri Clerici, Claude Nourmont, Barbara Pietrzak kaj Loes Demmendaal respondis plej diversajn demandojn, i.a. pri la festado de la 100-jariĝo de UEA, Internacia Jaro de Lingvoj, UK en Roterdamo kaj eksteraj rilatoj de UEA.

Kun 12 ekzempleroj la reeldonita “Vivo de Zamenhof” estis la plej furora libro de la tago. Sekvis ĝin “Informado praktike” de Ziko van Dijk (11) kaj la bildstrio “Zamenhof bildrakonte” (10). Aliaj popularaj titoloj estis “Beletra Almanako” (7), “La lingvo serena” de Baldur Ragnarsson (6), “Fraŭlino Maitreyi” de Mircea Eliade (6) kaj la nederlanda eldono de “Esperanto per rekta metodo” de Stano Marĉek (5). Entute la Libroservo de UEA vendis librojn k.a. varojn por 2858 eŭroj.

La venonta Malferma Tago okazos sabaton, la 26-an de aprilo 2008, kaj estos dediĉita al la 100-a datreveno de la fondo de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MALFERMA TAGO – KAJ UK EN MOSKVO

Dufoje jare la Centra Oficejo de UEA okazigas Malferman Tagon, kiam ĝi invitas esperantistojn viziti ĝin, aŭdi interesajn prelegojn, aĉetumi en la libroservo, renkonti la oficistojn kaj estraranojn de UEA. Ĉi-jare, la 24-an de novembro 2007, ankaŭ mi trafis al tiu ĉi aranĝo (kvankam, jes, ne la unuan fojon).

Mi uzis la verbon “trafis”, ĉar la vizito organiziĝis sufiĉe neatendite – unu monaton antaŭ la aranĝo oni invitis min veni, por partopreni seminarion pri informado kaj la retaj aferoj, kiun la nova estraro de UEA decidis okazigi en la CO la sekvan tagon post la Malferma Tago. Kaj, ĉar mi dum pluraj jaroj estas volontule prizorganta la retajn aferojn de UEA, oni kredis dezirinda, se ankaŭ mi ĉeestus.

Por ke la rakonto estu pli in-



la modernaj ŝrankoj

teresa, mi eble rakontu pri ĝi "turismece", do, laŭ la principo "kion mi vidis, pri tio mi kantas".

... Roterdamo, la urbo de la Universala Kongreso en 2008, en kiu mi jam estis multfoje antaŭe, mirigis min ekde la unua paŝo: mankis en ĝi la kutima stacidomo. Oni plene malkonstruis ĝin por ekkonstrui ion novan kaj modernan. Same rekonstruata montriĝis la apuda kongresa centro – sekve de kio, kiel klariĝis poste, UK-93 okazos en alia roterdama kongresejo. Tiu havas facile memoreblan nomon: "Monda Komerca Centro".

Ĉio cetera, feliĉe, estis surloke, kaj ankaŭ la Centran Oficejon mi trovis sur la sama loko. Tamen ne tute tian, kian mi vidis ĝin lastan fojon antaŭ tri jaroj: la tradiciegaj bretaroj kun laŭjare/alfabete starigitaj E-libroj, eldonitaj dum la tuta historio de Esperanto, formigris el la dua etaĝo al la unua kaj "kaŝiĝis" en modernajn ŝrankojn kun bank-aspektaj turniloj. Same tien foriris multnombraj kestoj kaj paperujoj, antaŭe ne tro orde stokitaj en diversaj ĉambretoj kaj la subtegmentejo. Ĝenerale ĉio akiris multe pli modernan aspekton. En la dua etaĝo, sur la loko de la du antaŭaj bibliotekaj ĉambroj nun aperis granda salono kun movebla son-izola ŝirmilo-muro meze.



Ulrich Lins

Speciale por la Malferma Tago la Iniciata Grupo pri invitado de Universala Kongreso al Moskvo preparis kaj eldonis koloran faldfolion pri Moskvo – kun la invito al UEA konsideri nian ĉefurbon kiel eblan kongreslokon por la jaro 2010. Mi alportis kelkdek tiajn faldfoliojn kaj interkonsente kun la oficistoj de CO metis ilin sur la specialan tablon por senpagaj varbiloj kaj reklamiloj. Mi ne pensas, ke tre multaj vizitantoj de la Malferma Tago prenis ilin, sed tio estis antaŭvidebla – tro da diversaj allogaĵoj estis ĉirkaŭe. Al ĉiuj gravaj por la decidado personoj mi mem enmanigis la faldfoliojn, laŭeble kun komentoj kaj klarigoj pri la invito kaj la situacio.

La ĉefparolanto de la Malferma Tago ĉi-foje estis d-ro Ulrich Lins, tre erudicia E-historiisto kaj elokventa preleganto. Li prelegis dufoje, ambaŭfoje por plenaj salonoj. Mi sufiĉe bone kaj delonge konas lin kaj tial estis agrable rerenkontiĝi kaj iomete interparoli. Interalie mi eksciis (plena novaĵo por mi), ke lia filo Marko Naoki Lins kaj ties edzino (ankaŭ esperantistino) nun laboras en la germana ambasado en Kiev. Jen bonŝanco por la ukrainiaj esperantistoj...

Interesege prelegis ankaŭ Stano Marĉek, la redaktoro de la revuo "Esperanto" – kvankam ĉi-foje ne pri la revuo. Lia temo estis la mirinda serio de tradukoj de lia lernolibro "Esperanto per rekta metodo". Ĝi aperis jam en 14 lingvoj, i.a. en la rusa. La lernolibro jam vendiĝas en Rusio kaj estis unu el la furoraĵoj en RET-07.

Kiel ĉiam sarkasme, sed nerefuteble logike prelegis Ziko van Dijk, prezentante sian novan libron "Informado praktike". Nu, mi ne pri ĉio kun li konsentas, sed

ĉiam estas interese lin aŭdi.

Vera ĝuo, kiel kutime, estis ĉeesti la prezentadon de Jorge Camacho, unu el la plej konataj modernaj E-verkistoj kaj poetoj. Li prezentis kelkajn siajn lastatempajn librojn kaj la novan jaran revuon “Beletra almanako”, kies ĉefredaktoro li estas. Li deklamis, rakontis, ĵonglis per vortoj, diskutis kun la ĉeestantoj... Ĉio pasis tre verve kaj en belega kaj spritega Esperanto. Mi revas, ke li iam venu al iu el niaj rusiaj E-renkontiĝoj…

Interesa por mi estis la prezentado de la francdevena politika partio “Eŭropo – Demokratio – Esperanto”. Estas imitinda sperto, sed, kiel mi tuj komprenis post du-tri demandoj, surbaze de la rusia politika juro ni havas neniujn ŝancojn por ripeti ion similan. Se mi bone memoras, la francoj bezonis nur kelkdek personojn por registri la partion – kaj poste la ŝtato disponigis al ili senpagan televidan tempon por sinreklamado ktp. Tamen eble ie sur la loka nivelo ankaŭ en Rusio tio proveblus.

Ankoraŭ mi ĉeestis la prezentadon de Pola Radio kaj ne ĉeestis prezentadojn de la grupo “Esperanto@Interreto” (tutegale mi ĉion pri ili scias, ĉar ofte kunlaboras) kaj de la usona videokurso “Pasporto al la tuta mondo” (pro la paraleleco kun Camacho).



La ĉeestitajn prelegojn mi filmis per videokamerao – la malĉeestitajn, nature, ne. Kaj, bedaŭrinde, troviĝis neniu alia, kiu ilin filmus – kaj kun kiu mi povus poste interŝanĝi kaj vidi la nevizititajn. Kelkajn el la videoj mi jam sekvatage publikigis en Interreto – helpe de la redaktoro de la reta gazeto “Libera Folio” Kalle Kniivilä – kaj memstare, en <http://video.google.com> (oni serĉu per la vortoj “Malferma Tago”). Miascie, tio estis la unua amasa prezento de la prelegoj de Malferma Tago en Interreto, do ne estas mirinde, ke jam dum la sekva semajno ilin spektis duoble pli da homoj, ol vizitis la aranĝon en Roterdamo.

Jam post la Malferma Tago kaj la sekvataga seminario pri informadaj aferoj mi finfine havis ŝancon detale interparoli kun la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller pri la rusia invito por UK. Estis pluraj demandoj, duboj, je kiuj mi klopodis doni respondojn kaj klarigojn. Ekzemple, ke Moskvo vere estas tre multekosta urbo, sed ke ni havas firman promeson de la moskva registaro pri malavara financa subteno. Ke malgraŭ fojaj akraj diskutoj, rusiaj esperantistoj scipovas kune labori kaj kune atingi siajn celojn, ktp.

Finfine li diris, ke eble povus esplore veni al Moskvo en aprilo 2008. Kun neniaj antaŭaj promesoj kaj garantioj, ke nia propono akceptiĝos, kompreneble. La

vizito ĉefe estus dediĉita al traktadoj kun la Moskva registaro, sed certa tempo estus donita al konatiĝo kun la rusia E-movado. Jam pli poste Osmo Buller menciis, ke lastan fojon li vizitis nian landon antaŭ preskaŭ 20 jaroj kaj plezure ĝin revidus.

Do, jen tia interesa programero antaŭvideblas por la moskva E-movado en aprilo 2008.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

E-KURSOJ TRA LA LANDO

Jen estas la listo de ĉeestaj E-kursoj, komenciĝintaj en Rusio ĉi-aŭtune. La listo estas bazita sur ĉiuj eblaj informoj, inkluzive de onidiroj. Unue ĝi aperis en la reta dissendolisto <reu-agado> kaj estis korektita kaj kompletigita fare de la listanoj.

– *Vladivostok*, estis planataj du kursoj – por ĉiuj dezirantoj ĉe Supera Popola Lernejo ĉe Fororienta universtitato kaj fakultative por la studentoj de la universitato. (inf. A.Titaev)

– *Tomsk*, malgrandan kurson por kvar personoj gvidas Konstantin Obrazcov.

– En *Novosibirsk* la 19-an de septembro pasis gastkurso, okazigita de Aleksandr Osincev kaj Arina Osipova (jekaterinburganoj). Tiu gastkurso servis kiel allogilo por kunvenigo de nova grupo da insteresiĝantoj, kiuj komencis studi E-on gvidate de Katja Arbekova.

– En *Ĉeljabinsk* la konatigan E-kurson en Ĉeljabinska Stata Universitato, kiun partoprenis averaĝe pli ol 20 studentoj-lingvistoj, finis 10 personoj. Gvidis Vjaĉeslav Roĵdestvenskij. Fine de la kurso pli ol 20 studentoj konatiĝis en la universitato kun uralaj junularaj aktivuloj Aleksandr Osincev kaj Arina Osipova, speciale invititaj el Jekaterinburg kune kun Raja Kudrjavceva. Rezulte de la renkontiĝo en la universitata ĵurnalo "Universitata kajo" aperis artikolo de unu el la studentoj "Просто эсперанто" ("Simple Esperanto"). Oni povas legi la artikolon en la ĵurnala retejo <http://un.csu.ru/gazeta/134/2170_1.html>. (inf. G.Terentjeva)

– En *Ĉeboksari* dum la LF dekoj da personoj enskribiĝis por studi E-on.

– En *Uljanovsk* septembre-oktobre pasis elementa kurso, post kiu restis kelkaj personoj, kiuj nun daŭrigas la studadon kadre de la klubo. (inf. J.Karcev)

– *Murmansk*, pli ol dek personoj aliĝis al la nova E-kurso ĉe E-klubo "Murmano". (inf. A.Rjazancev)

– En *Tiĥvin* ĉi-aŭtune ne estis aranĝita nova porkomencanta kurso, sed daŭrigas laboron la tradukista metiejo. Post dujara trejnado kvin volontuloj ektradukis la romanon de fratoj Strugackij "La burgo kondamnita". Ĉiu tradukas apartan ĉapitron; dum la ĉiuĵaŭdaj kunvenoj okazas interŝanĝo de opinioj, kritiko, lernado, polurado de tradukitaj pecoj ktp. (inf. M.Bronŝtejn)

– *Soĉi*, estis planita kurso kadre de Tagoj de Internacia Lingvo fine de oktobro.

– En *Krasnodar* okazas E-kurso, kiun partoprenas dek gestudentoj. La kurso pasas en kulturdomo de fervojistoj. Ĝin gvidas Anatolij Ivasenko. (inf. V.Bespalov)

– En *Moskvo* unu grupon instruas Svetlana Smetanina, almenaŭ unufoje okazis intensa E-kurso de Irina Gonĉarova.

Pri aliaj urboj estas nek rektaj, nek nerektaj informoj.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

REU-JARLIBRO POR 2007

Aperis kaj dissendiĝis la Jarlibro de REU por 2007. La Jarlibro aperas aŭtune jam la duan sinsekvan jaron – pro la supozo, ke ĝis tiam ĉiuj dezirantoj aliĝi jam aliĝis. Ja unu el la ĉefaj funkcioj de la Jarlibro tradicie estis publikigo de la membrolistoj. Ĉi-jare la membrolisto estas escepte granda – ankoraŭ neniam en sia historio REU havis tiom da kotizpagantaj membroj – 402 (komence de oktobro).

Krom la membrolistoj, la ceteran parton de la broŝuro okupas Kontakta Adresaro – adresoj kaj aldonaj informoj de 130 e-istoj, kiuj konsentis publikigi siajn adresojn. Kelkaj estas kun fotoj. Ĉar la preskvalito de la Jarlibro restis sama kiel en la antaŭaj jaroj, la fotoj ne aspektas sufiĉe bone kaj tio jam vekis iom da kritikoj pri la Jarlibro flanke de la membroj. Do, la klarigo estas la aŭtuna aperigo – la buĝeto jam estas preskaŭ elspezita kaj mankas en ĝi rezervoj por draste plialtigi la kvaliton de la Jarlibro. Tial nun oni pensas, ke sekvajare indus aperigi la Jarlibron kolore – kaj printempe.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

RIMARKOJ PRI LA JARLIBRO

Ĉi-jare la Jarlibro montras nur unu flankon de la REU-agado: laboron kun la membraro kaj aliaj esperantistoj. Rezulte ĝi estas detala membrolisto plus detala adresaro. Kaj ĉi detaleco ebligas vidi, kvazaŭ tra lupeo, certajn mankojn de tiu laboro.

Estas trafe, ke kovrildorse en la kotiztabelo aperis grava indiko pri la statuta limigo, ke membri en REU oni rajtas ekde la 18-jara aĝo, kaj pri la eblo por 14-17-jaruloj aliĝi kandidate. Bedaŭrinde, en la praktiko ĉi tiu diferenco fojfoje estas neglektata, kaj en la listojn de membroj trafas junaj personoj, kiuj laŭaĝe rajtas esti nur kandidatoj.

Ekzemple, inter membroj, aligitaj de Samara E-Organizo (p.6), estas nomita Kirill Medvedev. Mi konas la knabon: li pasintjare kun la gepatroj estis en nia kongresa karavano. Laŭaspekte li neniel povis esti plenaĝa, kaj Mikaelo Ĉertilov konfirmis: efektive, li naskiĝis en 1992. Tial en la membrolisto, publikigita en REGo (№ 5 (42), p.15), apud lia nomo aperis la indiko "(kandidato)". Sed la pretigintoj de la Jarlibro (A.Grigorjevskij, N.Gudskov, A.Osokin) evidente legas REGon ne tre atente, tial en la Jarlibro similan indikon ni jam ne trovas.

Tamen kial mi riproĉu pri REGo, se la kompilintoj ne atentis eĉ tion, kio estas en la Jarlibro mem? En la lasta parto (p.29) oni povas vidi adresojn de 16-17-jaraj knabinoj el Volgogrado: Oljga Carjova, Marija Stepanova, Marija Ŝaligina, Anastasija Taldikina. Kaj ĉiuj kvar troveblas en la listo de membroj, aligitaj de Volgograda E-klubo "Espero" (p.6), sen ajna indiko pri kandidateco. Inter individuaj membroj (p.4) estas listigita (same sen indiko pri kandidateco) Marija Medvedeva

el Saratov, kies neplenaĝeco evidentiĝas sur p.25…

Kiu scias, kiom da similaj junaj "ĉumembroj" ankoraŭ kaŝas niaj membrolistoj? Trudiĝas konkludo, ke la membrigo al REU estas farata sen eĉ plej elementa aĝkontrolo – ĉu membrokresko ajnarimede?

Kaj ankoraŭ unu atentigo, alispeca. Mi trovas stranga rubrikigon en la lasta parto per latinliteraj rusaj nomoj de la federaciaj subjektoj, ekz. "Permskij kraj". Interne de adresoj tio normalas, ĉar la adresoj estas destinitaj fincele por poŝtistoj. Tamen rubriktitole – pardonu! La vorto "Permskij" estas propra, ĝi ja povas uziĝi en neasimilita formo, sed kio estas "kraj"? Tiu vorto en Esperanto ne ekzistas, oni devus ĝin traduki.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

ELEKTADO DE KOMISIONOJ KOMENCITA

La nova Estraro de UEA ekokupiĝis pri la lasta stadio de la elektoprocezo en la Asocio, dum kiu ĝi nomumas komisionojn kaj komisiitojn por specifaj laborkampoj. La plenumado de tiu granda tasko postulos plurajn monatojn.

Jam en sia unua kunsido en Jokohamo la Estraro reelektis Humphrey Tonkin (Usono) kaj Michela Lipari (Italio) respektive kiel prezidanton kaj sekretarion de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj de UEA. Surbaze de ilia propono la Estraro poste nomumos la juĝantojn de unuopaj branĉoj. La komisiono pri Internacia Kongresa Universitato konsistas el d-ino Sabine Fiedler (Germanio), Wen Jingen (Ĉinio), prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Aŭstrio), prof. d-ro Humphrey Tonkin (Usono) kaj prof. d-ro Amri Wandel (Israelo), kiu funkcios kiel nova sekretario de IKU.

Al la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), kiu en la strukturo de UEA havas statuson de komisiono, estis elektitaj Humphrey Tonkin (Usono) kiel direktoro, A.Giridhar Rao (Hinda Unio) kiel sekretario, Detlev Blanke (Germanio), Mark Fettes (Kanado), Sabine Fiedler (Germanio), Federico Gobbo (Italio), Kimura Goro (Japanio) kaj la estrarano de UEA José Antonio Vergara (Ĉilio).

Komisiito pri la projekto Indiĝenaj Popoloj fariĝis Erik Felker (Usono). La Estraro konfirmis ankaŭ la konsistojn de du regionaj komisionoj. Tiun pri la Afrika Agado kunordigas Aimé-Florent Ntoto Zola (DR Kongo). La aliaj membroj estas Antoine Kouablan Kouassi (Ebura Bordo), Emile Malanda Nianga (DR Kongo), Francois Hounsounou (Benino), Jérémie Sabiyumva (Burundio), Adje Adjevi (Togolando), Charles Alofa (Benino) kaj Jean Codjo (Benino/Kanado). Al la komisiono pri Amerika Agado apartenas Maritza Gutierrez (Kubo) kiel kunordiganto, Martin Schaeffer (Germanio/Meksiko), Boris-Antoine Legault (Kanado), James Rezende Piton (Brazilo), Atilio Orellana Rojas (Argentino/Nederlando), Steve Brewer (Usono) kaj Ruben Sanchez (Argentino).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

FUNKCIULOJ DE UEA VIZITIS BJALISTOKON

La Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhaes faris laborviziton al Bjalistoko la 11-an kaj 12-an de oktobro. Temis pri ilia unua vizito al Bjalistoko post la decido de la Estraro de UEA, ke la 94-a Univer-

sala Kongreso de Esperanto en 2009 okazos tie por prifesti la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L.L.Zamenhof. La oficistojn akompanis la Ĝenerala Sekretario de UEA Barbara Pietrzak kaj, flanke de la loka esperantistaro, Jaroslaw Parzyszek kaj Elzbieta Karczewska, prezidantoj respektive de Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj Nina Pietuchowska, sekretario de Fondumo Zamenhof.

Denove konfirmiĝis la eksterordinare favora sinteno, kiun Esperanto kaj la okazigo de UK ĝuas ĉe la aŭtoritatoj de la naskiĝurbo de Zamenhof kaj kiu manifestiĝis en la Jokohama UK per la elpaŝoj de la urbestro, d-ro Tadeusz Truskolaski. Dum renkontiĝo kun la urbestro la reprezentantoj de UEA traktis diversajn aspektojn de la antaŭvidata urba subteno al la organizado de UK. Poste d-ro Truskolaski kaj Osmo Buller donis gazetaran konferencon, en kies komenco Buller transdonis al la urbestro specialan diplomon pri lia elekto kiel “Amiko de Esperanto” rezulte de voĉdonado de la reta gazeto “Freŝo”. La konferencon partoprenis ĵurnalistoj de multaj lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj. Krome, Barbara Pietrzak estis intervjuita de Pola Televido.

La funkciuloj de UEA diskutis pri UK-preparoj ankaŭ kun vicurbestro Aleksander Sosna kaj konatiĝis kun turismaj entreprenoj. Ili vizitis ankaŭ la ejojn de la Teknika Universitato, kiu funkcios kiel la ĉefa kongresejo de la 94-a UK kaj apud kiu estos starigita granda tendo por la inaŭguro kaj aliaj programeroj celantaj la tutan kongresanaron. En la densa programo estis ankaŭ multnombre vizititaj prelegoj al studentoj.

En kunsido kun profesorino Hanna Konopka, prezidanto de la Komitato de Fondumo Zamenhof, oni traktis la funkciadon de la Fondumo kaj ĝiajn planojn por estonteco. Post 20-jara serĉado de solida bazo por ĝiaj aktivaĵoj oni nun rigardas antaŭen kun optimismo, ĉar verŝajne la Fondumo baldaŭ ricevos propran ejon por starigi Zamenhof-muzeon, ekspozicion, bibliotekon kaj esplorejon pri Esperanto kaj interlingvistiko.

> Viron kun gravaj ostorompoj oni demandas en hospitala akceptejo:
> – Ĉu vi havas edzinon?
> – Ne, mi trafis sub aŭton.
> ***(per-esperanto-humuro)***

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA KAJ ILEI ĈE LA ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954, ĉeestis la 34-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko en Parizo (la 16-an de oktobro – la 3-an de novembro 2007) kiel observanto. La delegitoj de UEA estis la vicprezidanto pri eksteraj rilatoj s-ro Ranieri Clerici kaj la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe la Pariza sidejo de Unesko s-ino Rene Triolle kaj d-ino Barbara Despiney. La esperantistan partoprenon en la Unesko-konferenco plifortigis ankaŭ la observantoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj s-ro Jean-Pierre Boulet, s-ino Monique Arnaud kaj d-ro François Lo Jacomo.

Lige kun la Ĝenerala Konferenco okazis ankaŭ Internacia Forumo de Civila Socio la 25-an de oktobro. Flanke de UEA partoprenis Triolle kaj Despiney, flanke de ILEI Boulet. La publikan demandon de Rene Triolle al la ministro pri edukado de Jordanio, kial la ministro parolis angle, sed ne en sia propra lingvo, tiu ĉi respondis,

ke li “volis atingi pli grandan publikon”, sed poste li tamen parolis nur arabe.

La esperantistaj delegitoj efike utiligis la Konferencon kaj la Forumon por kontaktoj kun oficialuloj de Unesko kaj reprezentantoj de aliaj NRO-j. Ili disdonis multe da informiloj pri Esperanto, precipe diverslingvajn versiojn de la Manifesto de Prago kaj de la rezolucio de la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo. Al la irana ministro pri eksterlandaj aferoj s-ino Triolle povis donaci ekzempleron de la dulingva revuo “Irana Esperantisto”.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

SUKCESA KONKURSO EN SVISLANDO

La ĝeneva grupo “La Stelo” lanĉis kun subteno de Svisa Esperanto-Societo konkurson por 100 homoj kiuj pretas lerni Esperanton dum la venontaj monatoj, vidu ĉe <http://www.concours-esperanto.ch>.

La anonco esence diris: “Kun la celo pruvi, ke Esperanto estas facile lernebla lingvo, oni serĉas junulojn, kiuj ekde nun ĝis la 15-a de marto 2008 provos lerni la lingvon per iu ajn rimedo: libroj, kursoj, Interreto, privatinstruisto ktp. La premioj varias inter 500 kaj 3000 svisaj frankoj. Por partopreni la konkurson oni devos sendi originalan 200-vortan tekston en Esperanto plej malfrue la 15-an de marto 2008 kaj partopreni ekzamenon je fino de marto 2008”.

Fakte jam malmultajn tagojn post la lanĉo de la konkurso ni atingis 100 aliĝojn! Do ni havas jam la 100 kandidatojn, kiuj nun studas la lingvon por partopreni en la premiado. Kaj nun ankoraŭ daŭre venas pliaj interesiĝantoj!

Do oni jam nun povas paroli pri la plej sukcesa kampanjo okazinta por Esperanto en Svislando depost la tempo kiam Lidia Zamenhof en la 20-aj jaroj faris sian prelegvojaĝon!

Dietrich Weidmann, kunprezidanto de SES

UNU EL KVAR MEMBROJ UZAS LA RETAN JARLIBRON

Fine de oktobro jam 1524 individuaj membroj de UEA estis registritaj kiel uzantoj de la reta Jarlibro. Tio signifas, ke jam tuta kvarono de la individua membraro utiligas la eblon konsulti ĝisdatajn informojn, ekz. pri la Delegita Reto, kaj kontakti delegitojn per retletero sendebla pere de la reta Jarlibro. En la reta Jarlibro troviĝas ankaŭ informoj pri la membroj de diversaj organoj de UEA kaj pri landaj kaj fakaj asocioj. Eblas prepari kaj sendi retleteron ankaŭ al ili.

La uzantoj de la reta Jarlibro havas aliron ankaŭ al reta versio de la revuo “Esperanto” kaj, se ili estas membroj aŭ patronoj de TEJO, al “Kontakto”. Krom la eblo legi la plej novan revunumeron jam kiam la papera versio ankoraŭ estas presata, daŭre legeblaj estas ankaŭ ĉiuj numeroj de “Esperanto” kaj “Kontakto” ekde 2004.

La reta Jarlibro havas plej multe da uzantoj en Francio (157); sekvas Usono (125), Germanio (112), Brazilo (85), Japanio (85), Italio (68), Nederlando (58), Hispanio (52), Rusio (50) kaj Belgio (47). Individuaj membroj de UEA povas registriĝi kiel uzantoj de la reta Jarlibro en ĝia retejo <reto.uea.org>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2008

Individua kotizo – 100 rubloj (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 10 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 2500 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 250 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 35 rub., por familianoj de membro paginta individuan aŭ dumvivan kotizon kaj loĝanta samadrese (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 35 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 200 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 200 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Rabatita abono de “Komencanto” – 180 rub. (nur en Rusio), por ĉiuj membroj.

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo kaj “Komencanto” sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <membreco@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

"FLUGILOJ DE MALFACILA VENTO" CE AZOVA MARO

La 19-22-an de aŭgusto 2007 enkadre de Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-07) ĉe Azova maro en la urbeto Primorsko-Aĥtarsk okazis la instru-metodika seminario "Flugiloj de malfacila vento", kiu estas projekto de E@I kaj ILEI por komencantaj instruistoj de Esperanto kaj instruemaj esperantistoj. Gramatika parto de la seminario estis gvidata de Paŭlo Moĵajev (Ukrainio), kiu jam dufoje kunordigis kaj kungvidis la seminarion en du IJK (Kovrov kaj Zakopane), kaj de Aleksandr Osincev, kiu partoprenis la trejnseminarion "Gvidu la Flugilojn…" dum ĉi-jara Ago-Semajno (Pollando) kaj ĉi-foje staĝis kiel gvidanto de la metodika parto. Irina Gonĉarova (Odincovo), la ĉefkunordiganto de la projekto, helpis kiel observanto.

La seminarion partoprenis 11 personoj, 10 el diversaj urboj de Rusio kaj 1 el Ukrainio. La gramatika parto enhavis malfacilaĵojn de E-gramatiko kaj gramatikan ekzercadon. Dum la metodika parto oni pridiskutis diversajn metodojn de lingva instruado, planadon de leciono kaj kurso kaj specifaĵojn de Esperanto-instruado.

La seminario konsistis el 4 metodikaj kaj 4 gramatikaj poduhoraj programeroj dum 4 tagoj. Dum la tria tago okazis prezentoj de diversaj Esperanto-metodoj far spertaj E-instruistoj: d-ro Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu), Mikaelo Lineckij (Ukrainio), Slavik Ivanov (Sankt-Peterburg), Paŭlo Moĵajev kaj Irina Gonĉarova. Dum la 4-a tago partoprenantoj prezentis siajn 15-minutajn lecionojn. Ĉiujn kondiĉojn de partopreno plenumis 5 personoj, kiuj poste ricevis atestojn kun rekomendo kiel instruistoj de Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj iĝis membroj de ILEI.

kunordiganto kaj metodika gvidanto Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

UNIVERSITATA LEKCIO

La 16-an de novembro Aleksander Korĵenkov lekciis pri la temo "Interlingva komunikado. Planlingvoj. Esperanto" por studentoj pri filologio de la unua studjaro de la Ruslanda (eksa Kaliningrada) Ŝtata Universitato "Emanuelo Kantio" en Kaliningrad. Aleksander Korĵenkov, la redaktoro de "La Ondo de Esperanto" lekciis kadre de la kurso "Enkonduko en la lingvosciencon". Post la lekcio sekvis multaj demandoj. Kiel kutime, kelkaj studentoj el la kvindeko da ĉeestintoj esprimis sian deziron lerni Esperanton, sed, bedaŭrinde, ĉi-jare en Kaliningrad ne funkcias kurso de Esperanto, kaj al la dezirantoj estis rekomendite aliĝi al ret-kurso. Dum la lastaj jaroj Ruslanda Ŝtata Universitato ĉiujare invitas la redaktoron de "La Ondo de Esperanto" fari tiuteman lekcion por la estontaj filologoj.

(esperanto-rus-informoj)

INTERNACIA MARA ESPERANTA RENKONTIĜO

Tiu ĉi aranĝo kun la ĉeftemo "Originala Esperanto-literaturo" okazos de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2008 en Krajmorie (nova Esperanto-hotelo "Diana"),

Bulgario. En la programo estas planataj prelegoj pri la originala E-literaturo kaj elstaraj Esperantaj verkistoj. Ĉiutage okazos ekskursoj. Aliĝkotizo ĝis la 31-a de marto 2008 estas 10 eŭroj, loĝado en la hotelo kostas 20 eŭrojn tage por unulita ĉambro kaj 10 eŭrojn por dulita, trilita aŭ kvarlita ĉambro. La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, prelegejon, partoprenon en la programo. Konstanta adreso: Georgi Mihalkov, BG-1229 Sofio, ĵ. k. "Nadeĵda" V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario; retadreso: <modest@abv.bg>.

UEA INVITAS PRELEGI EN LA ROTERDAMA IKU-SESIO

Dum la 93-a UK en Roterdamo okazos la 61-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj ĝis 31.01.08 al la sekretario de IKU, *prof. Amri Wandel, 767, IL-71799 Makabim, Israelo;* rete <amri@huji.ac.il>.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego rajtas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ por AIS-kurso. La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos bonvenaj proponoj ligitaj al la kongresa temo "Lingvoj: trezoro de la homaro" aŭ al la 100-jariĝo de UEA. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝataj de la Komisiono pri IKU kaj fine konsiderataj de la Estraro de UEA. La proponintoj estos informitaj pri (ne)akcepto ĝis 15.04.08. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis 31.05.08. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per modesta honorario. Pliaj detaloj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

La prelegtekstoj de la 60-a IKU estas haveblaj kiel presita libro (120 paĝoj; red. A.Wandel; prezo 12,00 eŭroj plus afranko kaj, en EU, imposto 6%) kaj ankaŭ rete en la IKU-paĝo (vd. supre). Ankaŭ IKU-libroj de kelkaj antaŭaj jaroj estas plu aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA kaj rete legeblaj ĉe la IKU-paĝo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

VOLODJA DENISOV (27.08.1947 – 8.09.2007)

Oni nomis lin simple Volodja… Li estis *Homo sen aĝo*. Handikapulo ekde la 10-monata aĝo (postsekvoj de poliomjelito), dum la 60-jara vivo li neniam plendis. Trapasinte multajn operaciojn, malgraŭ konstantaj pieddoloroj li sukcese finis muziklernejon, poste – Kujbiŝevan (nun Samaran) ekonomikan instituton, finfine mem akiris la komplikan profesion de komputisto. Volodja estis homo, ĉiam strebanta atingi la veron.

Li povis trankvile ekzisti, loĝante kun la gepatroj, nenien strebante kaj vivi per la ŝtata subvencio. Sed li estis alispeca persono, kiu ĉiam allogis al si diversaĝajn homojn. Li fanatike ŝatis amatorajn kantojn, mem perfekte gitarludis, verkis poemojn kaj scenarojn. Volodja ne povis preterlasi la tradiciajn Gruŝin-festivalojn, al kiuj li veturis en propra malkomforta invalida aŭto. Estante la motoro de la loka

amatora kanta movado (KSP), li sukcesis fondi en Novokujbiŝevsk la propran KSP-klubon. Dankemaj klubanoj nomis ĝin "Gnomo" honore al Volodja. Dum oficialaj malpermesoj de Gruŝin-festivaloj en Kujbiŝev lia klubo iniciatis kaj sukcese anstataŭgis ilin apud Novokujbiŝevsk. Ĝuste tiam Denisov esperantistiĝis, post konatiĝo kun la esperantistino Larisa Sopiljnjak, kiu poste iĝis lia edzino.

Larisa iĝis por li donaco de l' sorto. Ŝi ne nur allogis lin en Esperantujon, ŝi kvazaŭ flugiligis lin. La belulino Larisa – "Miss E-to" de OkSEJT-23 en Ŝĉerbinka (Apudmoskvo), 1981 – tiutempe ricevis manproponon de Francisko, riĉa esperantisto el Francio. Ŝi tamen rifuzis al la franco, meditante: "Francisko havas ĉion krom mi, sed Volodja havas nenion krom mi", kaj edziniĝis al Volodja spite al akra oponado de siaj parencoj. La ravita Volodja dediĉis al Larisa sian solan eldonitan poemaron "Iam la virinon trovi...". Ili kreis dulingvan (ruse kaj E-te) version de slajd-filmo "Estos la pluvo karesa" laŭ la ampleksa albumo, eldonita en Esperanto en Japanio. La filmo estis vaste demonstrita ne nur en esperantista medio kaj ricevis publikan agnoskon. Volodja aktive partoprenis kelkajn esperantistajn aranĝojn malgraŭ sia malmobileco. En OrSEJT-24 (Piŝma, 1982) li iĝis komuna ŝatato kaj tendaranoj helpis transporti lin bicikle. Dum Ĉeljabinska "Liro" Volodja ĉarmis la ĵurianojn kaj la ĉeestantojn per plenumado de kantoj, tradukitaj de li mem, kaj sukcesis gajni la unuajn premiojn en du branĉoj... foreste (ĉiuj aŭskultis lian registritan voĉon). Kaj kiel ŝatis lin junaj esperantistoj el Toljatti, gviditaj de A.Kalaŝnikov!



Lastfoje mi vidis lin ĉi-jare dum la Gruŝin-festivalo. Volodja rapidis, mi sukcesis nur brakumi lin kaj demandi: "Kiam ni povas vin viziti por festi vian jubileon?". Volodja malĝoje ridetis kaj respondis: "Iam ajn". Li kvazaŭ antaŭvidis, ke proksimiĝas la fino. Kaj li strebis ĝui la vivon kiel eble longe. Semajnon antaŭ la morto li sukcesis memstare stiri la aŭton kaj partopreni la feston "La tamburoj de l' mondo". Reveninte hejmen, li subite eksentis anhelon, kaj Larisa veturigis lin en malsanulejon. Tie li sentis sin pli bone, des pli ke la kuracistoj estis liaj samklasanoj. Larisa trankviliĝis kaj intertempe decidis rapide veturi Ukrainion por helpi al sia paralizita onklino. Sed ŝi sukcesis nur atingi la landlimon, kiam ricevis la informon de ilia filino Nadja pri forpaso de la patro...

Niaj samideanoj tamen ĉiam rememoros lian helan personecon.

Ŝajnis, ke ĉiu urbano konis lin, tiom multe da homoj venadas nun al lia tombo, desegnistoj kaj forĝistoj preparis jam la skizon de la unika monumento, KSP-anoj planas aranĝi Denisov-festivalojn.

Igorj Fejgin (Samara)

la verda KoRo

kultura revuo

E-ELDONAĴOJ EN RUSIO EN 2007

La jaro 2007 donis riĉan rikolton de E-eldonaĵoj en Rusio. Entute aperis pli ol 20 titoloj. Elstara estis la kvanto de novaj aŭ renovigitaj ruslingvaj lernolibroj: kvar! Krome, plia ruslingva lernolibro aperis en Slovakio ("Esperanto per rekta metodo" de Stano Marĉek, tradukita de Bronislav Ĉupin), en la listo ĝi ne aperas. Kaj unu rusia lernolibro estis tradukita franclingven.

En la tereno de originala E-lingva verkaro la rezultoj estis malpli elstaraj – aperis nur unu libro: "Moskvaj sonoriloj", komuna eldono de REU kaj "Impeto". Tion parte rekompencas la admirinda evento, ke originala E-lingva furorverko de la antaŭaj jaroj – "Dek tagoj de kapitano Postnikov" de Mikaelo Bronŝtejn – aperis ruslingve!

En la kampo "tradukita prozo" la atingoj estas sendube fanfaronindaj: pro sukcesega kaj belega reeldono de "La Mastro de l' Ringoj", efektivigita de "Sezonoj". Kaj du novaj historioj de "La nokta patrolo", eldonitaj de "Impeto".

La suba listo estas provizora kaj ĝis fino de la jaro povos kompletiĝi.

<u>Eldonejo "Impeto", Moskvo</u>:

Heliko sur deklivo. *Arkadij kaj Boris Strugackij*. Tradukis M.Bronŝtejn. 247 paĝoj.

Ilustrita enciklopedio de akvariaj fiŝoj. 119 paĝoj.

La nokta patrolo. Historio dua. *Sergej Lukjanenko*. Tradukis M.Ĉertilov kaj S.Smetanina. 152 paĝoj.

La nokta patrolo. Historio tria. *Sergej Lukjanenko*. Tradukis G.Basov, M.Ĉertilov, S.Smetanina, A.Uljanov. 133 paĝoj.

Moskvaj sonoriloj. Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj. REU/Impeto. 159 paĝoj.

Десять дней капитана Постникова. *Михаил Бронштейн.* Tradukis A.Radaev. 367 paĝoj. *(Ruslingva traduko de "Dek tagoj de kapitano Postnikov")*

Международный язык эсперанто. Полный учебник. *Борис Колкер*. 262 paĝoj. ("Plena lernolibro" de Boris Kolker)

Полный словарь Эсперантскаго (международнаго) языка. Часть русско-эсперантская. *Д-ръ Эсперанто.* 280 paĝoj. (Reprinta reeldono de la "Plena vortaro rusa-internacia" de L.Zamenhof)

<u>Eldonejo "Sezonoj", Kaliningrad</u>:

Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro. *Aleksander Korĵenkov*. 16 paĝoj.

La flava hundo. *Georges Simenon*. Tradukis D.Luez. 119 paĝoj.

La Mastro de l' Ringoj. *J.R.R.Tolkien*. Tradukis W.Auld. (2-a eld). 3 volumoj: 462+368+328 paĝoj.

<u>Eŭropa Jura Universitato "Justo", Moskvo</u>:

Esperanto dum 7 tagoj. *Liana Tuĥvatullina, Gennadij Ŝilo.* 102 paĝoj.

Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco. *Aleksandro S. Melnikov*. Poznań – Moskvo – Rostov-na-Donu. 93 paĝoj.

Esperanto – la plej bona propedeŭtiko (laŭ la materialoj de Internacia konferenco la 13-an de aprilo 2007 en Moskvo). En la rusa kaj Esperanto. 150 paĝoj.

<u>Andrej Grigorjevskij, Ŝumerlja</u>:

Ŝtelado de fianĉino aŭ Kaŭkaziaj aventuroj de Ŝurik. Filmo. DVD.

Robinsono Kruso. Legolibro por geknaboj laŭ Campe. *Daniel Defoe*. Tradukis H.J.Bulthuis. Sonlibro. KD.

2055: автостоп в космосе. Фантастический учебник эсперанто. *Андрей Григорьевский.* 56 paĝoj. (Lernolibro en formo de kosmaj aventuroj)

2055: le stop dans l' espace. Manuel d' espéranto sous la forme de science-fiction. *Andreï Grigorievski*. Tradukis Skirlet. 65 paĝoj. (Franclingva versio de la sama kurso)



<u>Rusia Esperantista Unio</u>:

Jarlibro 2007. 32 paĝoj

Adresaro de RET-07. 16 paĝoj

<u>Garik Kokolija, Moskvo</u>:

Oraj kantoj por RET-07. 48 paĝoj

<u>Eldonejo "Vostok-Zapad", Moskvo</u>:

Учебник языка эсперанто. Начальный курс. *Клод Пирон и Ирина Гончарова.* 192 paĝoj. (Lernolibro de Irina Gonĉarova surbaze de "Gerda malaperis")

<u>Esperantaĵoj, varbiloj (ne enkalkulataj en la ĉi-supran statistikon)</u>:

Elstaris la serio da E-kalendaretoj, eldonitaj de Jurij Karcev (du specoj komence de 2007 kaj tri specoj fine de 2007). Belan kalendareton eldonis ankaŭ la organizantoj de Lingva Festivalo en Volgograd.

Indas mencii ankaŭ koloran faldfolion, kiun "Justo", MEC kaj REU eldonis por reklami Moskvon kiel eblan lokon por UK en 2010.

kompilis Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2008

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA invitas partoprenantojn por la 59-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 93-a Universala Kongreso en Roterdamo.

Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

POEZIO: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

PROZO: Maksimuma longo 200×65 karaktroj. Tri premioj.

TEATRAĴO: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

ESEO: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Lingvoj: trezoro de la homaro". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

FILMO: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo. Daŭro 15-60 minutoj. Tri premioj.

INFANLIBRO DE LA JARO: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2007. Unu premio.

La branĉo KANTO ĉi-foje ne okazos.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Oni sendu ilin por poezio, prozo, teatraĵo, eseo en unu ekzemplero; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Principe ĉiuj konkursaĵoj, escepte de infanlibroj kaj filmoj, akcepteblas rete.

Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2008. Por filmo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2008.

Ĉion oni adresu al: *Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio;* rete: <michela.lipari@tiscali.it>.

La konkursaĵoj (krom infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta retmesaĝo aŭ koverto, se oni sendas la tuton poŝte. Se eble, oni sendu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas, aŭ instrukciu debetigi propran UEA-konton per la sama valoro.

Premioj: Unua premio 230 eŭroj; dua premio 161 eŭroj; tria premio 92 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 161 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 483 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas ĉe *UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.* Ĝi legeblas ankaŭ ĉe la ttt-ejo de UEA <http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Abram sukcesis eskapi el la komunismo kaj elmigri Kanadon. Li trovis la eblon labori nur kiel arbohakisto. La labordonanto konsideris lin ne taŭga.

– Ĉu vi povas fari tiel pezegan laboron?

– Jes, mi havas grandan sperton.

– Pruvu! Kie vi hakis arbojn?

– En Saĥaro.

– Sed en Saĥaro ne estas arboj!

– Jen, la pruvo!

(juda anekdoto de Josef Shemer)

ĈIAMVERDA LERNOLIBRO
aŭ ankaŭ komencantoj povas vojaĝi en Esperanto-lando

Boris Kolker. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro. *– Moskvo: Impeto, 2007, 264 p. ISBN 978-5-7161-0172-2*

Ni ne scias, pro kiu kialo homo decidas lerni fremdan lingvon. Sed, verŝajne, la unua afero, pri kiu ĉiu studonto okupiĝas, estas serĉado de bona lernolibro. Malgraŭ tio, ke Interreto disponigas multajn studmaterialojn, oni ofte preferas malnovan bonan paperan libron. Ĝis antaŭ nelonge libro, kiun povis trovi rusparolanto por lerni E-on, vere estis malnova. Pli precize, oni ja eldonis kelkajn libretojn, sed ili estis tro malgrandaj por serioze lerni la lingvon. Do, lernontoj estis devigataj ĝoji pri akiritaj brokantaĵoj.

Feliĉe, la hodiaŭaj komencantoj en Rusio ne plu havas lernolibro-problemon, ĉar la moskva eldonejo "Impeto" aperigis renovigitan lernilon "Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro" de Boris Kolker, membro de la Akademio de E-o. Multaj konas lian brilan verkon "Vojaĝo en Esperanto-lando", sed rusparolantoj povis ĝui ankaŭ lian malnovan bazan lernolibron.

Tiu kurso por komencantoj havas longan historion. La aŭtoro komencis labori super ĝi en 1972. En 1973 tiu ĉi kurso estis publikigita en Ufa en regiona ĵurnalo "Leninec" (Leninano). La unua broŝura varianto aperis en Ufa en 1974 sub la titolo "Internacia lingvo Esperanto. Metodikaj rekomendoj kaj kontroltaskoj por la kurso". Poste tiu lernolibro estis multfoje reaperigita en multaj urboj de Sovetunio kaj estis tradukita en la estonan. En 1992 la plej granda rusia scienca eldonejo "Nauka" (Scienco) eldonis la lernolibron oficiale. La eldonkvanto impresas: 10 500 ekzempleroj! Kuriozaĵo estas, ke pri la libro okupiĝis la redakcio pri la orienta literaturo.

Jam la unua libroforma eldono de la nun modernigita lernolibro estis bonega. Multaj esperantistoj en Sovetunio konatiĝis kun E-o per ĝi kaj poste rekomendis ĝin al siaj konatoj.

La lernolibro konsistas el 20 lecionoj. Tipa leciono komenciĝas per vortlisto. En la komenco de la kurso aŭtoro apogas sin sur vortoj, kiujn rusparolanto kapablas kompreni sen traduko (plejparte sur internacia leksiko). Sed ĉe la fino de la kurso lernantoj konas jam ĉirkaŭ 1200 radikojn. La leksikan parton sekvas la teoria, enhavanta materialon en la rusa lingvo pri gramatiko, vortfarado kaj vortuzado, kun multaj ilustraj ekzemploj. La aŭtoro elegante tuŝas eĉ malfacilajn gramatikaĵojn.

Ĉiu leciono enhavas E-tekston (lecionoj 3-13 – dialogoj pri ĉiutagaj temoj; lecionoj 14-20 – tekstoj pri E-temoj), kiun la lernanto devas traduki rusen, kaj kvin

aŭ ses ekzercojn. En la unua ekzerco oni tradukas la E-vortojn en la rusan por memorfiksi radikojn kaj alkutimiĝi al afiksoj. En la dua ekzerco necesas traduki ofte uzatajn E-vortkunojn rusen. Tiuj vortkunoj estas ligitaj kun la leciona teksto en E-o kaj la traduktasko en la fino de la leciono. La trian ekzercon konsistigas frazoj, tradukendaj en la rusan. Tie la aŭtoro kolektis titolojn kaj citaĵojn el konataj beletraĵoj, aforismojn, eldirojn de famaj personoj, proverbojn, agitfrazojn, gratulojn ktp, kiujn la lernanto plej verŝajne konas ruslingve. Tiu scio helpas al li, unue, traduki kaj, due, kompreni, ke oni tradukas ne vortojn, sed sencon. En la sekva tasko oni tradukas frazojn aŭ mallongan tekston, ligitan kun la unua teksto de la leciono, en E-on. En la lasta tasko la aŭtoro proponas al la lernanto temon aŭ situacion por verki E-lingvan dialogon aŭ rakonton.

Post la ekzercoj en ĉiu leciono troviĝas kadro kun aŭtora alparolo. Jen ĝi temas pri atingitaj rezultoj, jen enhavas konsilojn pri studado, jen kuraĝigas la leganton, jen atentigas pri malfacilaĵoj, jen konatigas kun la E-medio. Interalie, la ĉeesto de la aŭtoro sentiĝas ankaŭ en aliaj etaj detaloj: ie li priskribas siajn amatajn lokojn, ie kvazaŭ mem rakontas pri evento, ie citas trafajn eldirojn de siaj konatoj... Lecionfine estas vortludo kaj kelkaj ruslingvaj priesperantaj tekstoj.

En la lastaj 5 lecionoj (kiuj fakte estas meznivela kurso) lernantoj tradukas nur Esperanten: en la unua ekzerco – afiksitajn kaj kunmetitajn vortojn, en la dua – vortkunojn, en la tria – specialajn frazojn, atentante emfazitajn elementojn (ekzemple, apartan kazon de la rusa lingvo aŭ rusajn homonimojn). En la kvara ekzerco necesas traduki en E-on tutan tekston kaj en la lasta, krea, verki propran rakonton laŭ proponita temo.

La libro entenas ankaŭ malgrandan E-rusan vortaron kaj respondojn al la unuaj taskoj de la lecionoj.

Bezonon de modernigo kaŭzis drastaj ŝanĝoj en Rusio, koncernantaj kaj la politikan situacion, kaj la ĉiutagan vivon. La libroj, eldonitaj en Sovetunio, estis iom ideologiizitaj, sed nun mencioj pri partia kongreso kaj kolĥoza ŝoforo ridetigas la legantojn. Certe, matenmanĝo en studenta bufedejo kostas nun multe pli ol 50 kopekojn, kaj oni nun rigardas en vendejoj ne skribmaŝinojn, sed komputilojn.

Grave renovigitaj estas ankaŭ la postlecionaj informaj tekstoj. Ili iĝis pli diversaj, ankoraŭ pli interesaj, pli modernaj, pli surprizaj: oficialaj dokumentoj kaj informo pri E-geografiaĵoj, eltiraĵoj el interlingvistikaj disertacioj kaj intervjuo kun Harry Harrison, impresoj de e-isto pri ruslingva beletra libro, en kiu agas Zamenhof mem, kaj artikoleto pri la Pasporta Servo. Utila aldono estas la indekso de gramatikaĵoj, helpanta rapide trovi koncernan lecionon.

Estas pliampleksigita la listo de E-mallongigoj en unu el la lecionoj. Unue, certe, oni devas koni ilin por kompreni E-tekstojn. Due, sen helpo multaj e-istoj ne povas ĝuste traduki la siglojn "UEA" kaj "UK" en la gepatran lingvon!

Post la trastudado de la baza kurso antaŭ ĉiu lernanto aperas la demando, kion fari nun. Por instigi al plia studado, la renovigita lernolibro inkludas la unuan lecionon el la perfektiga kurso de Boris Kolker "Vojaĝo en Esperanto-lando" kun ruslingva traduko.

Al ni tre plaĉas la belaspekta kaj atentokapta kovrilo de la libro (de la grafikisto

V.Te) kun bukedo el E-literoj. Bela kaj sencoplena!

La kurson oni povas uzi por memstara studado aŭ por E-kursoj, gvidataj de instruistoj. Kaj bonŝance instruistoj jam atendas gelernantojn ĉe la koresponda E-kurso por ruslingvanoj, funkcianta laŭ tiu ĉi lernilo ekde 1999 (nun ĉe la servilo “Yahoo! Groups”, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-kurso/>).

Multaj e-istoj en Rusio konas la unuan eldonon de la lernolibro de Boris Kolker, konsiderante ĝin nesimpla, tamen tre utila kaj cerbumiganta. Ni certas, ke la nova pli granda e-ista generacio en Rusio varme akceptos la novan eldonon. La E-lingvaj tekstoj kaj ekzercoj de tiu neordinara lernolibro povas esti utilaj ankaŭ por personoj, kiuj ne scias la rusan lingvon.

Anna kaj Mati Pentus (Moskvo)
(represo el *“Internacia Pedagogia Revuo”, 2007, № 4*)

BLANKO SUR NIGRO

En la eldonejo “Mondial” aperis E-traduko de la verko “Белое на чёрном” (Blanko sur nigro). Mi legis ĝin origine, en la rusa, kaj konsilas al ĉiuj nepre legi ĝin, ne gravas, ĉu en la rusa aŭ en Esperanto (la traduko de Kalle Kniivilä estas bonkvalita). Sube vi povas legi prezenton de la aŭtoro fare de la tradukisto kaj la antaŭparolon, verkitan de la aŭtoro speciale por la E-traduko. ***(Garik Kokolija)***

En 2003 Rubén Gallego ricevis la rusan Booker-premion por la verko “Blanko sur nigro”. La membiografia romano estas verkita ruse, malgraŭ la hispana nomo de la aŭtoro. Gallego estas nepo de iama estro de la Komunista partio en Hispanio. Li estas grave handikapita, sidas en rulseĝo kaj povas uzi nur kelkajn fingrojn. Lia patrino loĝis en Moskvo en 1968, kiam li naskiĝis. Al ŝi oni anoncis, ke li mortis baldaŭ post la naskiĝo. Efektive li ne mortis, sed estis kaŝita en diversaj infanejoj, kiuj iĝis la scenejo de “Blanko sur nigro”. Post la disfalo de Sovetio Rubén Gallego ekhavis kontakton kun sia familio, ekloĝis en Hispanio kaj iĝis hispana civitano. Nun Rubén Gallego loĝas en Usono. Laŭ lia peto la traduko baldaŭ aperos ankaŭ brajle, por blinduloj. La aŭtoro verkis apartan antaŭparolon por la Esperanta eldono.

Kalle Kniivilä (Svedio)



Sunon celi – jen feliĉo de la agla koro.
Suben ne ekflugu,
Suben ne rigardu.
Sube – kaĝo ombra kaj malvasta,
Sube – loko kie mortas sklavoj.
Suben ne ekflugu,
Suben ne rigardu.
Sube – mondo malfortula,

Sube – mondo de homaĉoj.
Suben ne ekflugu,
Suben ne rigardu.
(Vasilij Eroŝenko, traduko el la japana de Sakamoto Syozi)

Sufiĉas. Tiuj versoj sufiĉas por diri, kiel mi ĝojas pro la eldono de mia libro en Esperanto. Vasilij Eroŝenko eble pli bone ol multaj, multaj el ni esprimis la deziron disŝiri sin de la realo, ekflugi en la ĉielon. Kaj resti tie, alte en la ĉielo. Flugi ĝis la suno, bruli, perei, sed resti si mem.

Por ĉi tiu libro mi ricevas luksan honorarion, malavaran donacon. Mi ne ŝercas. Esperanto estas la lingvo de la revo. Esperanto estas lingvo de idealistoj. Mi ŝatas revi. Mi estas iomete idealisto. Oni sendos al mi mian libron, eldonitan en Esperanto kaj presitan en la skribo de sinjoro Braille. Oni ne devas esti tro naiva revanto, oni povas ne esti centprocenta idealisto, sufiĉas lasi en sia animo iom da sentimentaleco kaj ĝoji, ke la libron legos ĉiuj blindaj esperantistoj sur la planedo.

Ankaŭ la vidantoj min ĝojigas. Min ĝojigas ĉiuj legantoj en ĉiuj lingvoj, sendepende de la kvanto de brakoj kaj gamboj, la akreco de la vido kaj aŭdo. Mi ĝojas pro ĉiu leganto. Sed tamen, tamen. Leganto, kiu perceptas miajn librojn palpe, saĝa, scivola leganto, kiu sufiĉe malpigris por lerni la ekstravagancan lingvon Esperanto, kompreneble meritas plian respekton.

Mi dankas ĉiujn estontajn esperantistajn legantojn pro la bela lingvo Esperanto, pro la atento al mia kreado.

Legu. Ĉi tiu estas bona libro. Mi esperas, mi tre volas kredi, ke malbonajn librojn oni ne tradukas kaj ne verkas en la lingvo de la revo, la lingvo de la espero. Esperanto.

Rubén Gallego

THORSEN-APOGO AL KVIN BIBLIOTEKOJ

Kvin bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller estis subvenciitaj la bibliotekoj de la madagaskara Itaosy Esperanto-Klubo (125 eŭroj), Sankt-Peterburga Esperanto-Societo “Espero” (135 eŭroj), Kolombia Esperanto-Ligo (190 eŭroj), Kuba Esperanto-Asocio (200 eŭroj) kaj Bonaera Esperanto-Asocio (230 eŭroj).

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997, kiam UEA ricevis mondonacon por tiu celo de ges-roj Thorsen, ambaŭ forpasintaj en la jaro 2006. Ĝis nun la fondaĵo disdonis subvenciojn por 14000 eŭroj. Petoj pri subvencioj en 2008 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de oktobro. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

TTT-ejo dediĉita al la vivo kaj verkaro de Poul Thorsen (1915-2006) troviĝas ĉe la adreso <www.poulthorsen.dk>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

EN FINO ĈIAMAS KOMENC’

***Lusi Rimon (Israelo)** sendis sian tradukon de klasika ivrita versaĵo por la hebrea novjaro (ĝi okazas aŭtune):*

En fino ĉiamas komenc’
de io alia.
Ĉu bono plia?
Ĉu malbono plia?
Oni ne scias, io plia...

Se finiĝas la voj’, komenciĝas do pad’.
Ĉiam post noktofin’ ekas sunradiad’.
Ĉiun horon finitan sekvas nova horar’,
Nur post fino de scio komenciĝas erar’.

Pasis tago, sed jen – la morgaŭo por ĝi,
Plenumatas la rev’ – vicas io ali’.
Post la jaro finita novas la kalendar’,
La respondon permesas fino de l’ demandar’.

Post la fino de l’ film’ jenas la vivo mem’,
Regas nur vorta bru’, kiam mankas jam tem’.
Povas sonon ĉesintan rekrei eĉ sol’ –
Ne sufiĉas kompreno – komenciĝos parol’.

Lea Naor

De la 26-a ĝis la 28-a de oktobro en Soĉi okazis jam tradicia sudrusia E-renkontiĝo TILE-3 (Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto), en kiu partoprenis geesperantistoj el Krasnodar, Gelenĝik, Gorjaĉij Ključ kaj Soĉi. Sur la foto: grupo de partoprenintoj dum la vizito al la fama soĉia “Arbo de Amikeco”.



A.Ivasenko (Krasnodar)